

John Ellerton,  
Du lāsst den Tag, o Gott,  
nun enden

*tradukita de Raymund Weber*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

John Ellerton,  
The day Thou gavest, Lord, is  
ended

1. The day Thou gavest, Lord, is ended,  
The darkness falls at Thy behest;  
To Thee our morning hymns ascended,  
Thy praise shall sanctify our rest.

2. We thank Thee that Thy church, unslee-  
ping,  
While earth rolls onward into light,  
Through all the world her watch is keeping,  
And rests not now by day or night.

3. As o'er each continent and island  
The dawn leads on another day,  
The voice of prayer is never silent,  
Nor dies the strain of praise away.

4. The sun that bids us rest is waking  
Our brethren 'neath the western sky,  
And hour by hour fresh lips are making  
Thy wondrous doings heard on high.

...

John Ellerton,  
Forpasis tiu tag', Sinjoro

*tradukita de Frieder Weigold*

1. Forpasis tiu tag', Sinjoro,  
Kaj profundigās la senlum'.  
Vi gardis nin de ajn doloro.  
Nin gardu ankaŭ dum noktum'!

2. Ni rotacias en la tagon.  
En nokta paco dormas ni.  
Kaj portas lumon trans la maro  
La suno, kie brilas ĝi.

3. Senĉese kiel la mateno  
Briladas super tera rond',  
Eksonas laŭdo pro la beno  
Al ĉiu sur la vasta mond'.

4. La suno, kiu ĵus subiris,  
Ja brilas en plu fora land'!  
La gloron, kiun ni admiris,  
Anoncas plu preĝada kant'.

...

John Ellerton,  
Finiĝas nun alia tago

*tradukita de William John Downes*

1. Finiĝas nun alia tago,  
jam venis la vespera hor'.  
Kunvenis ni por adorago  
plaĉanta al la Di-Sinjor'

2. Ni dankas Vin, Savanto nia,  
ke sur la tuta mond-teren'  
la sankta eklezio Via  
staradas firme ĉe posten'.

3. Ruliĝas tero, brilas lumo  
de ne-ĉesanta maten-glor'.  
Leviĝas laŭdo, preĝ-parfumo  
konstante, kiel dolĉ-odor'.

4. Ekdormas ni post sun-  
subiro;  
gefratoj en la okcident'  
vekiĝas kun novtag-aspiro  
Vin glori per viv-elokvent'.

...

5. So be it, Lord; Thy throne shall never,  
Like earth's proud empires, pass away:  
Thy kingdom stands, and grows forever,  
Till all Thy creatures own Thy sway.

5. Pereas regnoj. Tiel estu!  
Kaj sole staras via tron',  
Ke sole via regno restu  
Je fina tag' sub unu kron'.

5. Formortos mondaj imperioj,  
sed Via regno kreskos plu.  
Al Vi sin cedos dinastioj,  
Venkinto estos vi, Jesu'!

...

...

...

...

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en la Germanan de Raymund Weber.

Arg-130-256 (2008-11-08 15:30:25)

Diese Übertragung ins Deutsche ist abgedruckt in dem Gesangbuch der Katholischen Kirche in Deutschland "Gotteslob", in der neueren Ausgabe. Der Text mit den Musiknoten findet sich auch auf der Heimseite [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).

Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15), publikigita 1870.

Arg-130-255 (2008-11-08 14:47:39)

Information about the author can be found on the website [http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton\\_j.htm](http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton_j.htm).

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.

Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro "Gotteslob" (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (\*1892 – †1987).

Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)

Tiu ĉi traduko aperis en la Ekumena Diserva Libro "Adoru", eldonita en 2001 de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj Kristana Esperanta Esperanto-Ligo (KELI), kanto numero 153.